# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO


**N° 211 DECEMBRO 2001**

La numero : 2 euroj Abono: 7 € Kotizo: 3 € Sume: 10 euroj

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E. = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE POUR L'ESPERANTO

*** *Sankta* PIO X-*a, preĝu por ni* ***

Imp. MOSER - 68127 NIEDERHERGHEIM



*Saint-Nicolas-de-Port*

# Sommaire/*Enhavo*


| | Pages/*Paĝoj* |
|---|---|
| Le mot du président-*La bileto de la prezidanto* | 3 |
| Prière - *Preĝo* | 5 |
| *Baziliko St-Nicolas* | 6 |
| *Protokolo de la komitatkunveno* | 8 |
| *En nia Asocio* | 9 |
| Nia enketo | 10 |
| Kalendaro | 13 |
| Aliĝilo de la 55-a IKUE kongreso | 14 |
| Anonco pri la libro "ADORU" | 18 |
| Abonnements - *Kotiztabelo* | 19 |


**ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO**


Expéditeur/:Ass. Cath. Française pour l'espéranto
*Sendinto* 9, rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR


**Motif de non distribution**

- ☐ Adresse insuffisante
- ☐ N'habite pas à l'adresse
- ☐ Refusé
- ☐ Autres


Périodique Semi-routé

**PORT PAYE**

COLMAR (68)

Surkovrile

Baziliko de
Saint-Nicolas-de-Port
(Meurthe-et-Moselle)
en Loreno.



**L'esperanto.** Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto.Specimenon kun represo aŭ tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio <u>nepre antaŭ</u> la 15.a de marto 2002. Venonta bulteno aperos fine de marto.

Finpresado la 03/01/2002


***FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO***

**Nro 211 Decembro 2001**

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Esperanto A.C.F.E )
CCP : 2 324 93 N Rouen



Prezidanto:
S-ro A. BESSIERE
28,Rue C.St-Saëns
76000 ROUEN
Sekretario:
F-ino A.M CHANEY
56,Rue Corvisart
75013 PARIS
Kasisto :
S-ro G.VILLENEUVE
14,Rue Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON
Religia Konsilanto :
P-ro HEROUX
Maison St-Joseph
26400 ALLEX
Peranto IKUE:
S-ro PONS Roger
Rue du 8 Mai 1945
87510 NIEUL
<u>Redakcio :</u>
Fam.BASSO-RESCIO
9,Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM
Fakse 0389794333
Retc 100623.3022@Compuserve.com


# Le mot du Président

"Même au plus fort de l'hiver, pense au printemps", proclame un dicton populaire. Je souhaite que vous ayiez celui ci à l'esprit en ce début d'année 2002.

Certes les esprits chagrins ne manqueront pas de souligner que notre monde est en quelque sorte au cœur de l'hiver et que nous ne saurions nous réjouir des difficultés évidentes qui nous assaillent tant sur le plan économique qu'international . Tout va mal assurent les pessimistes qui passent leur temps à se lamenter sur la dureté et l'incertitude des temps. Il est vrai que la préoccupation ne nous manque pas. Mais n'en a t-il pas été ainsi tout au long de l'Histoire des hommes et des peuples . Quelle époque a vraiment connu l'âge d'or ? Nos premiers frères chrétiens persécutés à outrance ? Le monde Romain s'effondrant sous la poussée des invasions barbares ? Les contemporains de la Peste Noire qui décima un tiers des habitants de l'Europe ? Ceux qui ont connu les guerres de religion avec leurs actes de fanatisme ou la guerre de Trente Ans avec ses horreurs et ses dévastations ?

En fait l'humanité a toujours connu des périodes de tension et d'épreuves. Mais chaque fois elle a su trouver dans la Foi le courage nécessaire pour surmonter les défis qu'elle rencontrait, faire face aux périls et finalement se relever et progresser à nouveau .

Alors ne cédons pas à la peur, chassons la crainte de nos cœurs et, sûrs de l'aide de Dieu, disons nous avec confiance les uns aux autres :

BONNE et HEUREUSE
ANNEE 2002

# La bileto de la prezidanto

"Eĉ dum la plej forta vintro, pripensu la printempon" asertas popola dirajô . Mi deziras, ke vi memoru ĝin en tiu komencanta jaro 2002 .

La tristemuloj ja ne forgesas substreki, ke nia Mondo, por tiel diri, estas en la kerno de la vintro kaj ni ne rajtas ĝoji pro la sendubaj malfacilajoj, kiuj alsaltas nin, tiom per la ekomonia flanko, kiom per la internacia. Ĉio estas malglate asertas la pesimistoj, kiuj daŭre plendadas pri la senkompateco kaj necerteco de nia epoko. Estas vere, ke la prizorgoj ne mankas al ni. Sed ĉu tio ne okazis tutlonge de la Historio de la Homoj kaj de la popolo ? Kia epoko vere konis la oran eraon ? Niaj unuaj kristanaj fratoj ekcese persekutitaj ? La Romia Mondo kolapsanta pro la Barbaraj invadoj ? La samepokuloj de la Nigra Pesto, kiu mortigis unu triononon de la eŭropa enloĝantaro ? Tiuj, kiuj ekkonis la fanatikajn terurajôjn dum la religiaj militoj aŭ la abomenajôjn kaj ruinigojn dum la Tridekjara milito ?

Fakte la homaro ĉiam travivis periodojn de streĉiteco kaj aflikto. Sed ĝi ĉiufoje kapablis trovi en la Fido la necesan kuraĝon por superi la defiojn, kiujn ĝi renkontis, rezisti al la danĝero kaj finfine releviĝi kaj denove prosperi.

Nu ni ne akceptu la timon, ni forpelu la timon el niaj koroj, kaj, kun la Dia graco, ni diru tutkonfide unu al la aliaj :

BONAN KAJ FELIĈAN
NOVJARON 2002




## MI DEZIRAS SEKVI VIN



En viaj manoj, Sinjoro,
Mi metas min tutkomplete.
Vi kreis min por Vi.
Mi deziras sekvi Vin.

En la ĝojo aŭ la malĝojo
Mi deziras akompani Vin.
Faru por mi, kion Vi volas.



Mi ne serĉas ekkoni anticipe
Viajn intencojn pri mi.
Mi ne diras:" Mi deziras sekvi Vin,
Kien Vi iros ", ĉar mi estas malforta.

Sed mi donas min al Vi,
Por ke vi konduku min
Kaj mi petas nur la necesan forton
Ho Sinjoro.

Laŭ kardinalo Newman. (nekonata verkisto)

Dans "La Vie" ,un lecteur écrit : << Dieu ne parle plus français . S'il ne parle plus français, c'est parce qu'il fait comme tout le monde, il parle anglais. Pendant longtemps, il a parlé latin et ce n'était pas plus mal à partir du moment où l'empire de Rome avait perdu sa puissance. Puis le latin a vieilli et est devenu langue morte. Quand Dieu parlait la langue de l'empereur de Rome, il parlait une langue dominatrice comme aujourd'hui l'anglais . Dieu doit être indépendant . Il existe aujourd'hui une langue neutre , l'espéranto, elle peut permettre à Dieu de s'adresser à tous comme le fait quelquefois son ministre sur terre, Jean-Paul II>>

## BAZILIKO de SAINT NICOLAS-de-PORT

Saint Nicolas-de-Port estas urbeto en Loreno. Iam ĝi nomiĝis "Port", pro la rivera trafiko longe de la Meurthe . Post la XIa jarcento multaj pilgrimantoj alvenis por honori la relikvon de Sankta Nikolao alportita el la urbo Bari (Italio) .

En la XVa jc. la influo de tiu urbo esti pli granda ol tiu de Nancy . Tiu urbo estis fama por la pilgrimantoj kiel Aix-la-Chapelle,Trêves, Vézelay,Romo aŭ St-Jacques-de-Compostelle.

Bedaŭrinde post la Tridekjara Milito ĝi perdis famecon .

*La Baziliko:*

Kiam iu sinjoro revenas de la krucmilito kun unu falango de Sankta Nikolao, li ankoraŭ ne sciis ke ĝi farigos miraklojn . Por akcepti la pilgrimantoj pli kaj pli multnombraj, René II decidis konstruadon de pli granda preĝejo. La konstruaj laboroj daŭris de 1481 ĝis 1560. De tiam reĝoj, dukoj, princoj alvenis por peti la protekton de Sankta Nikolao. La baziliko ricevas multajn damaĝojn dum la XVIIa jc. kaj denove dum la Dua Mondmilito.

Ĝi estis konsekrita kiel baziliko de Papo Pio 12a en 1950. En 1980 Camille Croué-Friedmann , origindevena de tiu urbo kaj loĝanta en Usono , donacas grandegan sumon por komplete restaŭrigi la bazilikon.

Nun la trezoro konsistas el pluraj altvaloraj pecoj, el kiuj la Relikva Brako de Sta-Nikolao en orarĝento, oro kaj arĝento

La arkitekturo estas en flama gotika stilo en formo de latina kruco.



## FRANCA INTERASOCIA ESPERANTO KONGRESO en LIMOGES (2an-4-an de Junio 2001)

Kadre de tiu kongreso, dank'al la afabla konsento de la loka organizanto,S-ro GUEGEN, kaj kun la beno de la Episkopo de Limoges, Ms-ro DUFOUR, katolika diservo en esperanto okazis la sabaton 2an de junio vespere, por Pentekosta Festo.

Celebrita de Pastro GIRAULT en la bela kapelo de religia komunumo proksime de la kongresejo, kaj akompanita de kantoj talente preparitaj kaj gviditaj de S-ro ANGEVIN, tiu diservo kunvenigis ĉirkaŭ 40 personojn, el kiuj triono estis kongresanoj . Ĉiuj aprecis tiun Fidateston pere de esperanto.

## KIO ESTAS LANDA REPREZENTANTO de IKUE ?

Memorigu ke la Landa Reprezentanto (L.R) de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista), ĉefe prizorgas pri la kolektado kaj transpago al la Centra Oficejo de IKUE en Romo, de la abonkotizoj pri IKUE kaj la revuo **"ESPERO KATOLIKA"**. Krome la L.R servas kiel administra ligilo rilate al tiu Centra Oficejo.

<u>La nuna L.R estas : S-ro PONS</u>
3,Rue du 8 Mai 1945 87510 NIEUL.

*Estus dezirinda ke multaj membroj de FKEA aliĝu al IKUE, kaj tiel partoprenu la internacian kaj ekumenan agadon de nia movado.*

# *PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO*
## *En Parizo la 24-an de Oktobro 2001*

Ĉeestis: S-ro Bessière, F-inoj Chaney kaj Hervier, P° Héroux, S-roj Chevalier,Lafargue,Pons kaj Villeneuve.

Petis senkulpigon: S-ino Lafargue, F-ino Michel, S-roj Colleu kaj Basso.
Observis : S-ro JL Texier.

La komitato konfirmis la prezon de la normala kotizo je 10 euroj kaj fiksis la aliajn kotizojn jene:
Paro 13 euroj,
Religiuloj kaj junuloj 5 euroj
Bonfaranto 30 euroj.

S-ro Pons raportis pri la diservo de P° Girault okaze de la nacia kongreso en Limoges. Pli ol 40 personoj ĉeestis tiun diservon en kiu S-ro Angevin majstre direktis la kantojn.

La komitato ĝojis pri la bona etoso en nia kongreso en Lisieux. Normanda bulteno kaj Le Monde de l'Esperanto bone raportis pri tiu kongreso.

S-ro Colleu rezignis pri sia komitatana ofico pro malbona sanstato. Kvankam ni esperas, ke ĝi pliboniĝos, ni devos anstataŭigi lin. Kandidatoj estas invitataj konatiĝi ĉe la prezidanto antaŭ la 28-a de januaro 2002

La prezidanto donis la rezulton de la enketo pri niaj kongresoj. Kvankam nur 18 anoj respondis, la ricevitaj respondoj valoras kaj estos utilaj. Vi aparte legos la detalojn de tiu enketo.

La komitato decidis , ke la ĝenerala kunveno en la jaro 2002 okazos en la kadro de la nacia kongreso de UFE. La membroj ricevos kunvokilon, kiel pasintjare.



Nia asocio denove reklamos en Le Monde de l'Esperanto , por konatigi sin.

Okaze de la sacerdota jubileo de Pastro Héroux, la prezidanto gratulis lin kaj transdonis al li libron (La fundamentoj de kristanismo) kaj monsumon.

La prezidanto raportis pri la kongreso de la italaj esperantistoj en Barza d'Ispra apud Lago Maggiore kaj prezentis la ekumenan libron Adoru.

La komitato dankis al s-ro Colleu pro la eldono de Rozario-libreto,verkita kun helpo de S-ino Lerouge.

La venonta komitatkunveno okazos en Parizo la merkredon la 30-an de januaro 2002.

## EN NIA ASOCIO

Nova membro:
Fratino SUREAUX M. (Vienne)
Bonvenon al la novulino.

Donacis monon:
S-ino MARTIN kaj anonimulo.

Bonfaranto 2002:
S-ro VILAS
Dankegon al ilia grava helpo al nia asocio.

Ni funebras kaj kondolencas .

Forlasis nin ĉi tiuj niaj gefratoj :
- S-ino BERTHAUX Renée (36)
- S-ro VANSPRANGHE Charles (59)

Al la familioj, sincerajn kondolencojn.
Ni preĝu por la ripozo de la animoj de tiuj karaj amikoj kaj gefratoj en Kristo.

# NIA ENKETO

Sinceran dankon al la 18 legantoj (13,84% de la membraro !) kiuj respondis la enketon . Iliaj opinioj estas valoraj kaj helpos la asocion organizi pli taùgajn kongresojn.
Jen la detaloj de la enketo :

| Demandoj | Jes | Ne | Eble |
|---|---|---|---|
| 1°) KONGRESO | | | |
| Ni kutime kongresas unu jaron el du de vendrede ĝis marde matene. | | | |
| -Ĉu vi aprobas tiun kutiman aranĝon ? | 13 | 1 | 0 |
| Dum la kongreso, ĉu vi deziras : | | | |
| -prelegon pri kongrestemo ? | 14 | 0 | 0 |
| -ekskurson ? | 12 | 2 | 0 |
| -vizito al urbaj vidindaĵoj ? | 14 | 0 | 0 |
| -distran vesperon ? | 13 | 1 | 0 |
| -ĝeneralan kunvenon ? | 14 | 0 | 0 |
| -Ĉu vi partoprenos la venontan kongreson ? | 3 | 4 | 9 |
| -Ĉu vi partoprenis en unu aù pluraj FKEA-kongreso(j)n dum la 6 pasintaj jaroj ? | 7 | 9 | 0 |
| 2°) SEMAJNA RENKONTO | | | |
| (Sabate kaj dimanĉe) | | | |
| _Mi preferas semajnfinan renkonton | 7 | 4 | |
| -Mi partoprenos la venontan | 2 | 5 | 5 |



| | Jes | Ne | Eble |
|---|---|---|---|
| 3°) TUTTAGA GENERALA RENKONTO | | | |
| (kun tagmanĝo,vizito al urbo,meso) | | | |
| Mi preferas tuttagan ĝeneralan kunveno | 4 | 8 | 0 |
| Mi partoprenos la venontan | 1 | 5 | 6 |
| Mi deziras ,ke ĝi okazu : | | | |
| - en Parizo | 4 | 3 | 0 |
| 4°) SIMPLA GENERALA KUNVENO | | | |
| Mi deziras simplan ĝeneralan kunvenon: | 6 | 4 | 0 |
| Mi deziras ĝin : | | | |
| - en Parizo | 3 | 5 | 0 |
| -dum la nacia kongreso de UFE: | 5 | 2 | 0 |
| Mi partoprenos la venontan | 2 | 1 | 11 |
| 5°) SE ONI ARANGOS KONGRESON AU SEMAJNFINAN RENKONTON: | | | |
| A) Mi deziras, ke ĝi okazu: | | | |
| - dum la Paska lerneja libertempo | 3 | 4 | 0 |
| - en majo | 7 | 1 | 0 |
| - en junio | 4 | 0 | 0 |
| - en septembro | 3 | 2 | 0 |
| - en oktobro | 3 | 3 | 0 |
| - en la sama urbo kiel la nacia kongreso de UFE, kaj antaù aù post ĝi . | 5 | 2 | 0 |
| B) Okaze de kongreso/semajfina renkonto: | | | |
| a) mi deziras loĝi; | | | |
| - en religia domo | 11 | 0 | 0 |
| - en hotelo | 8 | 1 | 0 |
| - en unulita ĉambro | 9 | 0 | 0 |
| - en dulita ĉambro | 5 | 4 | 0 |

| | Jes | Ne | Eble |
|---|---|---|---|
| b) mi estas preta: | | | |
| -organizi kongreson | 1 | 9 | 0 |
| - prelegi | 0 | 7 | 1 |
| - prezenti distran vesperon aù diapozitivojn | 1 | 6 | 1 |
| Aĝo: | | | |
| malpli ol 50 | 0 | | |
| de 50 ĝis 60 | 1 | | |
| pli ol 60 | 11 | | |
| PRI LA BULTENO<br>Kiuj artikoloj interesus Vin, ke ni enmetu en nia bulteno ? | | | |
| - pri la esperanto-movado | 15 | 0 | 0 |
| - pri katolikaj ne-esperantistaj aferoj | 11 | 2 | 0 |

La enketaj ciferoj indikas la jenon:

a) 13 homoj vere deziras kongreson unu jaron el du (72%) kun prelego,ekskurso kaj urbovizito. Multaj ankaù deziras maten-kaj vesperpreĝon kaj diservon.
b) La semajnfinan renkonton deziras 7 personoj sed 4 ne ŝatas ĝin.
c) La plimulto 44% ne volas tuttagan renkonton,kiun ŝatus nur 22%.
d) 33% deziras ĝeneralan kunvenon, sed 22% estas malfavoraj . Inter ili 5 deziras ĝin dum la nacia kongreso de UFE.Same 5 anoj malaprobas la lokelekton de Parizo.
e) Pri la bulteno, 83% deziras artikolojn pri la esperanto-movado kaj 61% pri katolikaj ne-esperantistaj aferoj.

Oni sugestas,ke niaj pastroj aperigu religiajn artikolojn pri religiaj temoj,religia historio, ekumena laboro.



# KALENDARO

## 2002

08/02 — STRASBOURG
Kunveno pri la libro "ADORU"
vidu P.19

17/05 ĝis 20/05 — STRASBOURG:
Franca Nacia Kongreso
(aparta kunveno de nia asocio)

20/07 ĝis 27/07 — Kromeriz (Ĉehio)
55a IKUE Kongreso
Vidu anoncon en aliaj paĝoj

Augusto — SEBRANICE (Ĉehio) apud Litomys
IKUE E-Tendaro.
En tendara frateca kaj amikeca etoso
Detalaj informoj kaj aliĝiloj estas haveblaj ĉe : IKUE-Katolika Sekcio
Trsicka ul.6 CZ-751 27 PENCICE .

03/08 ĝis 10/08 — FORTALEZZA (Brazilo)
87-a Universala Kongreso de Esperanto.

23/08 ĝis 28/08 — VERONA (Italio)
5-a Europa Kongreso de Esperanto

Sept. — LUCCA (Italio)
Itala Katolika Kongreso

MALFERMU LA PORDON AL KRISTO!
INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA
55-a KONGRESO
KROMĚŘÍŽ
20.-27.07.2002
ĈEĤA RESPUBLIKO

# La 55a IKUE-KONGRESO OKAZOS EN ĈEĤA RESPUBLIKO
## Kroměříž — 20-27 julio 2002

**La kongresurbo**

La nomo de la kongresurbo Kroměříž *(prononcu Kromierzij)* estas certe malfacile prononcebla por eksterlandanoj. La urbo troviĝas en Moravio - landparto de Ĉeĥa Respubliko, situanta surborde de rivero Morava (220 m super marnivelo). Ĝi estas urbo negranda (30 mil enloĝantoj), kiu pro sia situo, beleco kaj signifo allogas vizitantojn el la tuta mondo. Ĝia Ĉefepiskopa Kastelo (iama sidejo de episkopoj kaj iliaj korteganoj de ĉefdiocezo Olomouc) kun vastaj kastelaj ĝardenoj estas envicigitaj en listo de mondaj kulturaj kaj naturaj heredaĵoj de UNESKO. Kaj nur kelkajn metrojn de la kastelo troviĝas la Ĉefepiskopa Gimnazio, kiu fariĝos agrabla kongresejo de la 55a IKUE-Kongreso. La dekstra flanko de la Ĉefepiskopa Gimnazio estas per Muelila Portalo *(Mlynska brana)* kunigita kun la kastelo. Maldekstre ĝi najbaras kun la gotikstila preĝejo de sankta Maŭricio. Aldone al multaj aliaj historiaj vidindaĵoj, en la urbo troviĝas la preĝejo de sankta Johano la Baptisto, la barokstila perlo kaj paroĥa preĝejo de la Ĉielenpreno de Beata Virgulino Maria, iama romanikstila konstruaĵo rekonstruita en novgotika stilo. Dum libera tempo oni povas ĝui belaĵojn, promenante en la ĉarma Florĝardeno, en la kastelaj ĝardenoj aŭ gustumante vinon en la tute proksimaj Ĉefepiskopaj Vinkeloj.

Urbo Kroměříž estas atingebla peraŭtomobile, pertrajne aŭ perbuse. Peraviadile oni atingas urbon Brno, eventuale Pragon kaj de tie pertrajne Kroměříž. Ĉiu aliĝinto ricevos detalajn informojn pri vojaĝkoneksoj, kiuj ebligos senprobleme atingi la kongresurbon.

**Skizo de provizora programo**

**Sabato, 20.7.2002** - Akcepto kaj loĝigo. Vespera manĝo. Sankta Meso en preĝejo de sankta Maŭricio. Kant-provoj por la inaŭgura Sankta Meso.

**Dimanĉo, 21.7.2002** - Matenmanĝo. Rozaria preĝo. Inaŭgura Sankta Meso en la preĝejo de sankta Maŭricio. Solena inaŭguro de la kongreso en Deputirara Salonego en la Ĉefepiskopa Kastelo. Tagmanĝo. Libera posttagmezo. Vespermanĝo. Interkona vespero finiĝota per vespera preĝo.



**Lundo, 22.7.2002** - Matenmanĝo. Matena preĝo en la kongresejo. Prelego. Tagmanĝo. Sankta Meso en la preĝejo de sankta Johano Baptisto. Vespermanĝo. Vespera programo en la kongresejo.

**Mardo, 23.7.2002** - Matenmanĝo. Matena preĝo en la kongresejo. Vizito al la Ĉefepiskopa Kastelo kaj historiaj urbaj vidindaĵoj. Tagmanĝo. Perbusa pilgrimo al pilgrimloko: Baziliko de la Ĉielenpreno de Virgulino Maria sur monto Hostyn. Sankta Meso kun episkopo kaj Krucvojo. Vespermanĝo. Koncerto en la preĝejo de sankta Maŭricio.

**Merkredo, 24.7.2002** - Rozaria preĝo. Sankta Meso en la preĝejo de sankta Maŭricio. Matenmanĝo. Ĝenerala Kunveno de IKUE. Tagmanĝo. Vizito de la Flora Ĝardeno, promeno en la Kastelaj Ĝardenoj. Vespermanĝo. Ĝenerala Kunveno de IKUE - dua parto; je la fino: vespera preĝo.

**Ĵaŭdo, 25.7.2002** - Matenmanĝo. Prelego. Tagmanĝo. Perbusa ekskurso kun Sankta Meso. Vespermanĝo. Libera ripoztempo.

**Vendredo, 26.7.2002** - Matenmanĝo. Prelego. Tagmanĝo. Rozaria preĝo kaj Sankta Meso en la preĝejo de Ĉielenpreno de Beata Virgulino Maria. Vespermanĝo. Adiaŭa vespero - bunta programo de la kongresanoj; je la fino: vespera preĝo.

**Sabato, 27.7.2002** - Matenmanĝo. Sankta Meso en la preĝejo de sankta Maŭricio. Solena fermo de la kongreso. Tagmanĝo. Adiaŭo kun la kongresurbo Kroměříž.

*Helpe de viaj proponoj kaj sugestoj oni formos definitivan programon, kiu postlasos ĉe ĉiuj kongresanoj neforgeseblajn rememorojn pri la 55-a IKUE-Kongreso kaj entuziasmon aktivadi kadre de la katolika Esperanto-movado.*

**Pri urbo Kroměříž** - La nomo de la urbo havas slavan devenon. Ĝia nuna formo historie evoluiĝis el malnovslava Kromezirj (germ. Kremsier, latin. Cromesir). En 11a jc. ĝi fariĝis havaĵo de la episkopejo de diocezo Olomouc, tial ĝi fariĝis kortega rezidejo de la episkopoj de Olomouc. Dum kelkaj jarcentoj la urbo Kroměříž travivis diversajn tragikajn situaciojn, precipe pro la husana revolucia movado kaj la posta tridekjara milito. La kadukiĝon de la urbo haltigis en la 16a jc. episkopo Karel Lichtenstein, kiu estas konsiderata la dua fondinto de la urbo. En la 17a kaj 18a jarcentoj Kroměříž iĝis kultura centro de Moravio. El tiu tempo devenas la nuna aspekto de la urbo. Post levo de episkopejo Olomouc je rango de ĉefepiskopejo Kroměříž fariĝis sidejo de la ĉefepiskopo. Aldone al la bela kastelo kun subkastela ĝardeno, ekzistas la paroĥa preĝejo de la Ĉielenpreno de Virgulino Maria, la preĝejo de sankta Johano Baptisto, la preĝejo de sankta Maŭricio. En la urbo staras multaj historiaj vidindaĵoj.

## 55a Kongreso de IKUE - Aliĝilo

sendenda al Miloslav ŠVÁČEK, Tršická ul. 6, CZ-75127 PENČICE, Ĉeĥio

**Mi aliĝas al la 55a Kongreso de IKUE 2002 en Kroměříž, Ĉeĥio:**

Tuta nomo: S-ro, S-ino, F-ino ____________________

*Bonvolu skribi vian familian nomon MAJUSKLE kaj la personan nomon minuskle*

Adreso: ____________________

____________________

Poŝtkodo: __________ Lando (en Esperanto): __________

Naskiĝdato: __________ Sekso (signu per kruceto): ina ❑, vira ❑.

Telefono: __________ Faksnumero: __________

Retadreso: ____________________

Mi deziras dividi la ĉambron kun: ____________________

Mi/ni planas alveni je *(dato kaj horo, se eblas):* __________

Mi/ni planas foriri je *(dato kaj horo, se eblas):* __________

Mi/ni planas alveturi per:

aŭtomobilo ❑, trajno ❑, buso❑, aviadilo/trajno ❑

**Loĝado:**

❑ **Mi/ni mendas en la kongresejo:**

❑ plur-litan ĉambron (du-litaj ĉambroj estas rezervitaj al geedzoj).
Ni estas geedzoj kaj petas ❑ du-litan ĉambron en la kongresejo.

❑ **Mi/ni mendas en hotelo Bouček:** ❑1-litan ĉambron, ❑2-litan ĉambron
❑ 1-litan apartamenton, ❑2-litan apartamenton

_Mi/ni ne mendas tranoktadon: ❑.

_Mi/ni mendas en la kongresejo nur manĝojn (vegetarajn oni ne preparas):

matenmanĝojn ❑, tagmanĝojn ❑, vespermanĝojn ❑

Mi proponas jenajn kontribuojn al la kongresa programo:

Prelegon je temo: ____________________

Programerojn por distra vespero: ____________________

Alian programon: ____________________

***La aliĝo validas post pago de minimume la aliĝ-sumo.***

**Pagmaniero:**

Mi pagis (sendis) la sumon de __________ je la __________

❑ al banka konto de la ĉeĥa IKUE-Sekcio (KB Přerov 194214890297/0100)

❑ per poŝtmandato

❑ perletere al s-ro Miloslav Šváček, Tršická 6, CZ-75127 Penčice

Dato: __________ Subskribo: __________

## 55a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista
## Kroměříž (Ĉeĥa Respubliko) 20-27 julio 2002

### Kongresaj kotizoj

*pageblaj en ĉeĥaj kronoj, eŭroj aŭ usonaj dolaroj.*

**Tarifo A:** Ĉiuj landoj sen B.

**Tarifo B:** Eŭropa Unio, Skandinavio, Svislando, Nord-Ameriko.

**1.Kongresa aliĝ-kotizo** *(ne repagebla) por ĉiu persono pagenda antaŭ la kongreso:*

| Limdato | Tarifo A | Tarifo B |
|---|---|---|
| **ĝis 31.3.2002** | 10.- eŭroj | 20.- eŭroj |
| **ĝis 31.5.2002** | 15.- eŭroj | 30.- eŭroj |
| **ekde 1.6.2002** | 20.- eŭroj | 40.- eŭroj |

Gejunuloj malpli ol 25-jaraĝaj ĝuas 50% rabaton de la koncerna kotizo laŭ grupo/periodo.

**2.Kongresa kotizo pagenda en la kongresejo** *(inkluzivas tranoktojn, manĝojn, busvojaĝojn):*

A: 90.- eŭroj, gejunuloj 50.- eŭroj
B: 140.- eŭroj, gejunuloj 80.- eŭroj

**Nur manĝoj sen tranoktoj:** A: 50.- eŭroj, B: 80.- eŭroj

**3.Hotelaj prezoj en Hotelo Bouček por 7 noktoj**
*(pagendaj en hotelo, alkalkulu eblan inflacion):*

ĉambro loĝigita de 1 persono 210.- eŭroj,
ĉambro loĝigita de 2 personoj 280.- eŭroj,
apartamento loĝigita de 1 persono 360.- eŭroj,
apartamento loĝigita de 2 personoj 450.- eŭroj.

*Grava atentigo! La menciitaj kotizoj inkluzivas neniun asekuron. Ĉiu kongresano por kongresaj tagoj prizorgu por si la asekuron (precipe sanitaran) en sia lando.*

**La aliĝilon oni traktos kiel validan** post ricevo de aliĝkotizo. Aliĝkotizon oni povas sendi al banka konto de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio: KB Prerov, kont- numero 194214890297/0100, aŭ per poŝtmandato je nomo kaj adreso: s-ro Miloslav Šváček, Tršická 6, CZ-75127 Penčice, Ĉeĥa Respubliko. Al tiu adreso (kun ebla risko de la sendinto) oni povas sendi la aliĝkotizon en bone pakita kaj registrite sendita leterkoverto.

**La aliĝilon sendu al**

**IKUE-Katolika Sekcio de ĈEA, Miloslav Šváček, Tršická 6, CZ-75127 Penčice, Ĉeĥa Respubliko.**

*Eldonita de IKUE kaj KELI, eldonejo PONTO-VERLAG 2001*
*ISBN 3-9803793-5-3 - 1472 paĝoj, 105 x 190 mm.*
*Presita sur 33-g-fajna biblia papero - solide bindita kun ruĝa lina kovraĵo*

Kristana kantlibro en Esperanto kun la titolo ADORU aperis en junio 2001, produktita en la presejo de la renoma eldonejo Herder en Freiburg, Brisgovio (Germanio).

Temas pri evento komparebla kun la apero de E-tradukoj de la Sankta Biblio en 1926 kaj la Roma Meslibro en 1995.

Redaktis la tuton la pastroj Adolf Burkhardt (evangeliana) kaj Albrecht Kronenberger (katolika). Gitarajn akordojn reviziis kaj komponis renoma fakulo, eklezia muzik-direktoro Ernst Leuze.

# *ADORU*

La verko, sur plej alta profesia nivelo, tre taugas varbo-cele por pruvi al kristanoj kaj eklezianoj, ke E-o vivas ankaŭ en la eklezioj kaj utilas por interpopola kaj interkonfesia komprenigô.

## EKUMENA DISERVA LIBRO

Ĝi enhavas liturgiajn tekstojn el diversaj tradicioj, katolika, ortodoksa kaj reformacia. Pli ol 900 kantoj (kun muziknotoj) el pli ol 20 lingvoj spegulas la tradicion de almenaŭ dek konfesioj.

Por diservoj okaze de E-kongresoj ĝi estas grava helpo, sed ankaŭ por persona uzo. Kiel literatura verko poezia, ADORU varbas por la intereso ankaŭ de esperantistoj ekster la kristana medio.

**La libro kostas 19,80 EUR plus sendokostoj (*)**

Ĝi estas mendebla ĉe la libro-servoj aŭ ankaŭ ĉe:

**TAKE-ESPERANTO**
**90,Rue du Tiefenbach**
**F-68920 WINTZENHEIM**

Luksa eldono ankaŭ haveblas: en nigra ledo bindita, kun orumita tranĉ-rando 48 EUR plus sendokostoj (*)

(*) Sendokostoj varias laŭ la lando al kiu ni sendos la libron.
Por ĉiu mendita libro: Eŭropo: 3,61 EUR - Afriko, Azio, Ameriko: 3,87 EUR
Oceanio: 4,13 EUR

## Lastminute

Je la 7-a de februaro 2002 kunvenos en Strasburgo en la Centre Culturelle St-Thomas iom pli ol 20 esperantistaj ĝis mardon ,12.2.02. Ĉefa temo estas ADORU (la nova preĝ- kaj kantlibro) .
pliaj informoj: 0049772122073 Pastro Eichkorn.

## Kotiztabelo 2002

I.K.U.E kun "Espero Katolika" — 25 eùroj
Peranto : S-ro PONS Roger
Rue du 8 Mai 1945
87510 NIEUL.
al kiu vi sendos ĉekon je la nomo de S-ro Pons

A.C.F.E kun "Franca Katolika Esperantisto"

| | |
|---|---|
| unuopulo | 10 eùroj |
| geedza paro | 13 eùroj |
| gejunuloj ĝis 25jara, pastro,religiu(in)o | 5 eùroj |
| bonfaranto | 30 eùroj |

Pagu al la kasisto :S-ro VILLENEUVE G.
14,Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON
al kiu vi sendos ĉekon je la nomo de Association Catholique Française pour l'esperanto

Dépot légal : 4eme trimestre 2001 — C.P.P.A.P : N° 62532
Imprimé par : A.C.F.E à 9,Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM
Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996
Directeur : Albert BESSIERE — Directeur délégué: Michel BASSO